

6. Same, p. 121.
7. Berkov P., "Historio de rusa komedio de la XVIII-a jarcento", Leningrado, 1977, p. 34.
8. Stennik Ju., "Sumarokov", en "Historio de rusa literaturo en kvar volumoj", red. Pruckov N., v. 1, Moskvo, 1980, p. 554.
9. Ĉi tie kaj plue mi citas la komedion de Sumarokov "Kverelo de edzo kun edzino" laŭ la libro: "Rusa komedio de la XVIII-a jarcento", Moskvo-Leningrado, 1950.
10. Berkov P., "Historio de rusa komedio de la XVIII jarcento", Leningrado, 1977, p. 36.
11. Same, p. 37.
12. Same, p. 34.

Adreso de la autorino:

Ludmila MURSALIJEVA

Doktoro pri Filologiaj Sciencoj

Docentino de Baŝkiria Ŝtata Universitato

UFA - BAŜKIRIO

RUSIO

Hejma adreso:

RU 450044 UFA - 44

ul. Komarova, d. 26, kv. 21

Tel.: 007-3472-42-03-42.

## **Problemo de "Innerlichkeit" en germana literaturo de la XX-a jarcento. (Verkaro de Wilhelm Raabe).**

Tatjana AVAGJAN (RU)

"Innerlichkeit" en germana lingvo signifas "enprofundiĝo en si mem". Ĝi estas grava specifa trajto de mondkoncepto kaj mondpercepto de germana burĝaro.

Pro historiaj kondiĉoj la germana burĝaro estis konservativa kaj strebis eviti ĉian politikan agadon. Tio forte influis la tradiciojn de germana burĝa spirita kulturo. Germana burĝaro strebis deflankiĝi de la socia vivo, foriri en la mondon de intensa spirita aktiveco, konservi sian spiritan sendependecon. De tio naskiĝis la fenomeno de germana kulturo kaj literaturo, nomata "Innerlichkeit".

La nocio mem de "Innerlichkeit" estas ne nur literaturscienca termino, sed ankaŭ socia kategorio. Thomas Mann donas tre profundan difinon de tiu nocio en sia artikolo "Germanio kaj germanoj" (1945). Li vidas ĝin en la disdubiĝo de homa energio je du elementoj: abstrakt-spekulativa kaj soci-politika, kaj la unua elemento subpremas la duan. (1) Li asertas, ke "Innerlichkeit" estas ne nur etika kaj estetika principo, sed ĝi estas parto de mondkoncepto kaj mondpercepto de germana burĝaro. Ni devas serĉi la fontojn de "Innerlichkeit" ne nur en la literaturo, sed ankaŭ en la historio kaj filozofio.

Tiuj fontoj troviĝas en la historio de la germana ŝtato. En la XVI-a jarcento la germana burĝaro kun subteno de kamparanoj kaj kavaliroj faras sian revolucion, kiu nomiĝas Reformado. F. Engels substrekas "siaspecan teologi-teorian karakteron de germana revolucio", "intereson por la fenomenoj, kiuj estas de alia mondo", kiel rimedo de distanciĝo de la mizera realo", (2) - kio iĝis unu el premisoj de "Innerlichkeit".

En la germana filozofia penso tiuj premisoj estas pli evidentaj. Ni trovas ilin en la serĉoj de silezia ŝuisto J. Böhme (1575-1624). F. Engels skribis, ke Böhme estis "malklera, sed profunda animo",



kiu sukcesis “flugi per siaj pensoj”, kaj “la popola kulturo en li levis sin ĝis abstraktaj ideoj, ĝis la plej gravaj problemoj de la konscio kaj estado”. (3) Böhme ne povis akcepti la mizeron de la germana vivo. Li senkaŝe esprimis sian malkontenton pri realo, li instruis, ke “la mondo deflankiĝis de la absoluto”, ke “la dia beleco foriris el reala vivo”. (4) Protestante kontraŭ malperfekteco de reala mondo, Böhme foriras en mistikon, rifuzas aktivan lukton, preparas la grundon por “Innerlichkeit”.

En la XVII-XVIII-aj jarcentoj la burĝaro ne montris politikan aktivecon, ĝi ne subtenis la nobelaron, timis kamparanojn, kaj pro tio iĝis apogo de princoj, kiuj uzis la rezultojn de la Reformado kaj prenis sur si la rolon de gvidantoj.

Sed la teoria bazo de “Innerlichkeit” estis preparita de germana klasika idealisma filozofio: Kant, Fichte, Schelling. Ili neis la eblecon de aktiva agado kaj transportis la problemojn de lukto en la internan mondon de persono. Iliaj doktrinoj kreis filozofian bazon, sur kiu aperis la romantikismo. Tiu adoptas la “Innerlichkeit” kaj transportas ĝian atmosferon en la literaturo

En Germanio la romantikismo formis universalan sistemon, kiu enhavis ĉiujn sferojn: filozofion, literaturon, muzikon, pentrarton. Plej komplete ĝi esprimiĝis en la literaturo. Germanaj romantikistoj ne akceptis mizeran realon, ili estis maksimumistoj kaj komence opiniis, ke nepre necesas ŝanĝi la realon. Sed kiamaniere? Ili revis pri tiu situacio, kiam “la tuta vivo iĝos poezio, kaj la poezio iĝos la vivo”. (5) Ili revis plialtigi la vivon ĝis la nivelo de poezio. Sed tiu celo estis nerealigebla, la romantikistoj ne povis lukti kontraŭ la leĝoj de objektiva realo, kontraŭ sia propra socia estado. La nova postrevolucia vivrealo montris al ili sian socian, burĝan vizaĝon, kiun ili malakceptis. Ili komprenis sian seneliran situacion. Post la flugo en “superstelaj mondoj” venis tragedieca konscio de tera gravito. La romantikistoj trovis la eliron: ili fariĝis kaŝemaj, koncentriĝis sur la personeco de artisto, forĵetante la konflikton inter revoj kaj realo pere de romantikisma ironio. F. Schlegel proklamis ke la romantikisma ironio estas pruvo de absoluta libero de verkisto. La verkisto estas tiomgrade libera, ke li rajtas ironie

primoki la tutan universon kaj la arton, kaj sian kapablon konkretigi absolutan veron de estado.

La senfineco estas ege ŝatata nocio de romantikistoj, ĝi forpuŝas la atingon de celo malproksimen. La romantikistoj proklamas maleblon atingi siajn celojn kaj pravigas homan senactivecon, kiu estas unu el nepraj kondiĉoj de “Innerlichkeit”. Ili kreas senmortajn herojn, perfektajn interne kaj ekstere, kaj tiamaniere ili montras “altan lirismon” de “Innerlichkeit”, faras ĝin ege alloga.

Dum sekvaj jaroj “Innerlichkeit” iĝis nepra parto de germana romano kaj donis al ĝi siaspecan karakteron. F. Vischer, poeto kaj estetikisto, asertas, ke romano devas esti poeziigita, ĝia objekto estas aparta personeco kun sia interna mondo. Laŭ lia opinio, “Innerlichkeit” estas unu el tri ĉefaj bazaj ŝtonoj de germana romano - kune kun “Privatisierung” kaj “Subjektivität”.

Dum longa tempo oni opiniis, ke W. Raabe, “Dichter der Nation”, dum tuta sia longa vivo estis unu el plej ardaĵoj esprimantoj de “Innerlichkeit”. Pri tio skribas klasika 12-voluma “Historio de germana literaturo”. (6) Sed dum lasta tempo tiu vidpunkto estas kritikata, ekz. en la libro de H. Kolbe. (7)

Ni scias, ke Raabe neniam akceptis plene iun filozofian sistemon. En la fruaj jaroj de sia verkado li kredis je “Innerlichkeit”, kiu iĝis parto de lia mondkoncepto. Li kompatis “malgrandan homon”, malaprobis burĝan progreson, sed, kiel multaj liaj samtempuloj, li ne vidis realan forton, kapablan kontraŭstari realan situacion. Pro tio li parolas nur pri interna perfektigo de homoj.

Lia unua larĝe konata verko estas “Kroniko de Pasera strato”. Ĝi ne estas romano, sed “Bilderbuch” - serio de bildoj pri “malgrandaj homoj”, pri malgrandaj eventoj de ilia ĉiutaga vivo. La rakontanto estas sciencisto Wackholder, kies vidpunkto ne ĉiam koincidas kun la aŭtora vidpunkto. Tiu kompozicio permesis al Raabe fari duplanan rakonton kaj reveni en la historian pasintecon de Germanio.

Wackholder estas samtempulo de la Granda Franca Revolucio de 1789 kaj de lukto kontraŭ Napoleono, li vidas barikadojn en



marto 1848. Samtempe li estas simbolo de germana burĝaro de la fino de la XVII-a - komenco de la XVIII-a jarcento. Raabe montras, ke tiu klaso estas firme ligita kun "Innerlichkeit". Antaŭe Wackholder estis aktiva naturo, same kiel la tuta burĝaro, sed en tiu tempo, kiam li verkas sian "Kronikon ...", li forlasis aktivan vivon, ŝanĝis ĝin kontraŭ pripensado kaj kontemplado kaj iĝis portanto de "Innerlichkeit". Ni ne povas diri, ke li ne plu interesiĝas pri la historia evoluo de Germanio, li ofte pensas pri tio, li opinias, ke ŝanĝoj estas bezonataj kaj neeviteblaj. Sed li opinias ankaŭ, ke la sola ebleco konservi sian personecon estas foriro de tiu peza situacio, kiu regis en Germanio en tiu epoko, fariĝi detenema. Wackholder vivas inter homoj kaj samtempe ekster la socio, la "Innerlichkeit" estas por li lasta savo en la tempesta mondo.

Tamen ne necesas forgesi, ke Wackholder ne estas Raabe. Raabe kvazaŭ surprovas la maskon de sia heroo, sed ni povas pensi, ke li jam hezitas. Lia heroo provas malakrigi konfliktojn pere de humuro, sed tio ne kontentigas Raabe. Pruvo de tio estas la persono de juna sarkasmoplena Ŝtobel, kiu komprenas, ke la pozicio de Wackholder ne estas firma, kaj komparas la konstruaĵon de ĝia "Kroniko .." kun infana dometo el diverskoloraj ŝtonetoj. Kaj Wackholder devas akcepti, ke li pravus. Ŝtobel aperas de la unuaj paĝoj kaj iĝas kunaŭtoro de la "Kroniko ...". Sed li ne estas pli proksima al aŭtoro, ol Wackholder. Raabe ankoraŭ ne faris sian elekton inter ili.

La sama problemo de burĝa spirito reaperas en la verko "Kroniko de Birda kvartalo", kiu estas unu el lastaj kaj plej valoraj verkoj de Raabe. Tiu romano estas unu el plej komplikaj kaj multsignifaj liaj verkoj, oni diskutas pri ĝi ĝis nun. La protagonisto Welten Anders aperas en duobla prilumigo. Lia amiko skribas la kronikon, - tio denove permesas al Raabe fari duoblan tempoplanon, montri la estantan tempon kaj pasintan. Sed la rakontanto havas ankaŭ alian funkcion en la romano: li devas montri nekutiman karakteron de Welter kaj la tragediecon de lia sorto de la vidpunkto de germana burĝaro kaj ĝiaj moralaj normoj. La rakontanto estas doktoro Krumhart, kiu kune kun sia familio,

profesio kaj ĉiuj siaj proksimuloj enkarnigas la mondon de burĝa stabileco kaj ordo. Samtempe li admiras sian amikon, kiu elektis la vojon de soleco.

Welten estas idealisto, edukita surbaze de la romantikisma kulturo, en la lando de fabeloj kaj revoj, li havas delikatan animon kaj koron, li estas fantaziulo kaj aperas antaŭ ni kiel riskema ludanto en la vivo. Li riskis ĉion sur la karto de sia amo, li perdis kaj detruis sian vivon kaj sian animon, li seniluziigis kaj krueliĝis kontraŭ si mem kaj siaj propraj sentoj. Li disvastigas iun allogon al malracionalismo, al abismo, al malpleno, ion similan je racieca nihilismo, li neas la "volon vivi", kiel Schopenhauer. La rakontanto Krumhart povus iĝi viktimo de tiu allogeco, sed kontraŭaj fortoj, sanaj kaj vivoplenaj subtenas lin. Tiuj fortoj troviĝas en la burĝaro, en la Birda kvartalo, en tiu patriarkeca mondo, kie la vivo moviĝas malrapide, kiu estas limigita kaj tradicieca. Tiu mondo ĉiam restas alloga kaj ĉarma por Welten kaj por Krumhart, kaj eĉ por Helena, kvankam en sia juneco ŝia sola revo estis forkuri el tiu burĝa medio, ŝi strebis en la vastan mondon, en Amerikon. La animo de Birda kvartalo konservas sian povon sur ĝiaj loĝantoj kaj loĝintoj, kie ajn ili estu.

La pozicio de rakontanto kaj same de la aŭtoro ne estas unusignifa. La pruvo de tio estas lirika stilo kaj same la sentoj de bedaŭro kaj amaro, kiuj videblas trans objektiva rakontado. Ne estas tre klare, kion preferas la aŭtoro kaj kion aprobas: la ordon de la burĝa mondo aŭ la genian renegaton, kiu detruas tiun ordon, - aŭ eble la aŭtoro akceptas nek tiun, nek alian poluson kaj restas sur sia pozicio de universala historiisto. Li kvazaŭ studas la simptomojn de venanta krizo de la burĝa kulturo kaj burĝa konscio, kiu estas firme ligita kun "Innerlichkeit". Ĉi tie la romantikisma tendenco de kontraŭstarado de la homo kaj la universo venas al sia logika fino kaj kuniĝas kun la dekadenta laciĝo.

Raabe mem donas ŝlosilon por kompreni tiun verkon, ĝi estas epigrafo, prenita el "Peter Schlemil" de A. Chamisso: "Ni donis animon al la ombro kaj transformis la animon en ombron." Raabe



vidas, kiel la vivo transformiĝas en halucinon, en ombron, - kaj tio estas la ĉefa problemaro de ĝia verko. En ĝi Raabe ne trovis novajn idealojn, sed li ne rifuzis malnovajn. Li daŭre restas sur siaj pozicioj de humanismo kaj rifuzas iluziojn. Lia "Kroniko..." estas plena de amara ironio. Li primokas sin mem kaj same "Innerlichkeit". En tiu verko Wilhelm Raabe resumas sian rilaton al la burĝaro: li perdis iluziojn pri ĝi kaj ne kaŝas sian ĉagrenon, li kritikas ĝin, kaj li restas fidela al la idealoj de humanismo kaj socia progreso.

### Literaturo

1. Mann T., "Verkaro en 10 volumoj", vol. 10, Moskvo, 1960, p. 320.
2. Marx K., Engels F., "Verkaro", vol. 18, p. 577.
3. Same, p. 572.
4. Berkovskij N., "Romantikismo en Germanio", Leningrado, 1973, p.160.
5. Karelskij A., "Verko de romantika animo" / "Germana romantikisma rakonto", Moskvo, 1977, p. 18.
6. Vidu: "Geschichte der deutschen Literatur" ("Historio de germana literaturo"), Berlin, 1975, p. 8.
7. Kolbe H., "Raabe. Vom Entwicklungs- zum Desillusionierungsroman", Berlin, 1981.

Adreso de la autorino:  
Tatjana AVAGJAN  
Doktoro pri Filologiaj Sciencoj  
Docentino de Baŝkiria Ŝtata Universitato  
UFA - BAŜKIRIO  
RUSIO

Hejma adreso:  
450071, Ufa - 71,  
Lesnoj Projezd, d. 8, kv. 32.  
Tel.: 007-3472-32-75-52.

## Vinfarado lau hejma metodo

Manuel Rodríguez RÁBAGO (CU)

Ekde pratempoj la homoj observis, ke laodoro de fruktoj kiuj falis teren post kelkaj tagoj estiĝis 'alkohola'. Eble tiel naskiĝis la ideo fari vinon.

Inter la hobiaj Kubaj estimoj troviĝas ankaŭ la hejma fabrikado de vino kaj la kulturado de gistoj. Sen memori la ekzaktan daton ankaŭ mi iam komencis fari vinon, sed mi memoras, ke mi serioze interŝanĝis spertojn pri tio kun Kuba esperantisto en 1987, kaj ekde tiam mi pli profunde dediĉis min al esploroj en la vinfarado pere de hejmaj metodoj.

Unue mi faris vinon el oranĝo pere de la jena recepto pri la aldonajoj:

- 12 funtoj da sukero,
- 2 litroj da fruktosugo au du funtoj da fazeoloj au rizo,
- 3 kuleretoj da gisto,
- 1/3 kulereto da agaragararo kaj
- 13 litroj da akvo.

Kiel iloj servis nur granda karafo kun ŝtopilo, ne-metalata sitelo, glaskirlilo, ŝprucigebla fermentado-tubeto kaj pumpiltubeto.

Jen la farado:

Verŝu la fruktosugon en la karafon; miksu en sitelo la sukeron kaj la akvon ĝis fina dissolvo; aldonu tiun solvaĵon en la karafon kaj movu ĉion por garantii la pli rapidan homogenan mikson.

Verŝu 1 litron da tiu refreŝigaĵo en glaskirlilo, aldonu tri kuleretojn da gisto kaj miksu bone.

Verŝu la kirlilmiksaĵon en vitra au plasta sitelo kaj atendu proksimume 1 horo, ĝis tiu miksaĵo komencas 'kreskiĝi'; verŝu ĝin tiam en la karafon, movu ĝin kaj kovru ties aperturon pere de gazo au simila ŝofo por permesi al la gisto sorbi aeron.

Post 8 ĝis 10 tagoj translokigu tiun bazan vinon en alian karafon kaj fermu tiun dum 7 tagoj helpe de ŝprucigebla fermentado-tubeto malpermesante eniron de aero.